Hermann Kletke,

# Kandelo ĉe l’ kristarbo lumas

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kandeloj ĉe l’ kristarbo lumas,
Solene, milde brila ĝi,
Kaj ŝajne ĝi al ni dirumas:
„Espera bildo estas mi.“

Jen staras ĝoje la infanoj,
L’okuloj ridas kaj la kor’,
Falditaj estas ĉies manoj,
Alvenas nun la sankta hor’.

Enpaŝas kaŝe la anĝelo,
Sendita al ni de l’ Sinjor’,
Li venis teren de l’ ĉielo,
Preĝinte ree iras for.

“Benataj estu vi olduloj,
Benata vi malgrandular’,
Benataj estu ĉiuj uloj,
Kun bruna kaj kun blanka har’!”.

..............................................
..............................................
..............................................
..............................................

. . .

................................................
................................................
................................................
................................................

*Traduko de la Germana poemo "Am Weihnachtsbaum die Lichter brennen" de* HERMANN KLETKE *(∗1813-03-14 – †1886-05-02) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1982-12.09.*

*Arg-558-1129 (2010-09-18 17:11:48)*

*Informon pri la verkinto Hermann Kletke oni trovas sub* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_Kletke`.